



THE OFFICIAL ORGAN OF THE BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION.

THE BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION (INCORPORATED).

17, Hart Street, London, W.C.1.

Telephone : Museum 617.

Telegrams : "Esperanto, Westcent, London."

Late Hon. President : DR. L. L. ZAMENHOF.

President : J. MABON WARDEN, F.F.A.

Vice-Presidents : J. D. APPLEBAUM, GEORGE J. COX, HARRISON HILL, W. HARVEY, DR. G. JAMESON JOHNSTON, F.R.C.S.I., JOHN MERCHANT, JOHN POLLEN, C.I.E., LL.D.

General Secretary : MONTAGU C. BUTLER.

Business Manager : HARRY A. EPSTEIN.

Hon. Treasurer : BERTRAM CHATTERTON, A.M.I.C.E.

The British Esperanto Association (Incorporated) is a Union of the Esperanto Societies throughout the Empire, and has been established for the following purposes (*inter alia*):—To promote in every way the spread of the International Auxiliary Language "Esperanto" by—

- (a) Promoting the formation of new local Groups.
- (b) Distributing information and publishing propaganda literature.
- (c) Organising examinations and granting certificates of proficiency.
- (d) Promoting lectures and arranging for loans of collections of literature, correspondence, etc.
- (e) Promoting arrangements for Congresses at home and abroad.

Also to maintain headquarters in London, where all Esperantists may obtain information and assistance in their work.

The Association consists of "Members," "Fellows," and Affiliated Groups and Federations. The Annual Subscriptions are —Members, 5s. ; Fellows, 10s. ; they can be received for several years in advance if desired. Membership forms and particulars of affiliation on application.

Members and Fellows are entitled to receive this journal free.

There are two Examinations of Proficiency : Preliminary and Advanced. Both may be taken by Correspondence. Full particulars of the Examinations will be sent on receipt of stamped addressed envelope.

The Text Book for the COMMERCIAL INSTITUTES
and BUSINESS COLLEGES.

Pitman's Commercial Esperanto

By W. M. PAGE.

Price 2s. 6d. (postage 3d).

Sir Isaac Pitman & Sons, Ltd., London
or B.E.A.

LA KVAKERISMO

verkita de T. CORDER CATCHPOOL.

Mallonga skizo pri la historio kaj kredoj de la Religia
Societo de Amikoj, populare nomataj "Kvakeroj."

Prezo 2 pencoj. Rabato por kvantoj

FRIENDS' COUNCIL FOR INTERNATIONAL SERVICE,

91, Bishopsgate, London, E.C.2, au ĉe

BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION,

17, Hart Street, London, W.C.1.

The Esperanto Manual.

The Text Book with 15,000 old friends
greet 5,000 new ones.

New Strong Green Cover. Price still 1/6.

POSTAGE EXTRA.

Special Terms to Teachers and Groups.

From 125, HAMBALT ROAD, S.W.4,

Or B.E.A., 17, HART STREET, W.C.1.

CINDRULINO

KAJ ALIAJ

TEATRAĴETOJ POR LA INFANOJ.

Kun du MONOLOGOJ.

Originale Verkitaj de LOUISE BRIGGS.

Rekomendinda por Infanoj en la Lernejo.

Prezo: 1s. 2p. Aŭfrankite.

B.E.A., 17, HART STREET, W.C.1.

BALDAŬ APEROS.

"Vivo de Zamenhof"

Verkita de D-ro. EDMOND PRIVAT,

sub la aŭspicioj de la "Bolingbroke Mudie Memorial
Fund."

PROVIZORAJ PREZOJ: Broŝurita 3/6 } Aŭfrankite.
Bindita 5/6 }

Plenaj detaloj aperos en venonta numero.

B.E.A., 17, HART STREET, W.C.1.

MACKAY & CO., LTD.,

PRINTERS

of this Magazine are in the position to undertake Printing
and Bookbinding of every description from a Card to
a Dictionary.

Write for specimens and prices to

FAIR ROW,

'Phone 23.

CHATHAM.

For the Instructor, Propagandist, Student of English Language
and Author of Intellectual Card-games,

ENGLISH AND ESPERANTO ETYMOLOGY.

ANGLA KAJ ESPERANTA ETIMOLOGIO.

"Very interesting."—*Argentine Esperantist and Spanish Esperantist.*

CHARLES G. STUART-MENTETH, B.A., Oxford (Honours).

For other laudatory criticisms see numbers of the "B.E." for May & June.

10d. (4 reply coupons from abroad) post free.

B.E.A., 17, HART STREET, LONDON, W.C.1.

DUTTON'S 24 HOUR

DUTTON'S SHORTHAND has only 6 rules and 29
characters. Complete theory learned in 24 hours. That
stage reached, practice quickly gives high reporting
speeds. Send 2 stamps for specimen lesson to Dutton's
College (Desk D 61.—*Brit. Esp.*) Skegness.

SHORTHAND.

AĈETU LA KONTRAŬPLUVAN BOTON

"SCHRIMSHAW"

kaj havu sekajn piedojn dum la venonta vintro.

La vintra-promenada boto por Sinjoroj.

El nigraj kaj brunaj ledoj, kun

Duoblaj plandoj.

Sendu poŝtmandaton de ses-dek ŝilingoj por unu paro,

Aŭfrankite al

S. Desborough, 21, Agnes Rd., Northampton.

THE BEST FOR ALL LANGUAGES.
Gregg EASY TO LEARN,
Shorthand TO WRITE,
TO READ.

All characters light; no thickening. Vowels inserted in
natural order. This makes reading as sure as longhand.

Esperanto adaption 1/6, post free 1/7½.

Particulars and copy of Magazine free.

THE GREGG PUBLISHING Co.,
21, HARRINGTON ST., LIVERPOOL.

The BRITISH ESPERANTIST.

THE OFFICIAL ORGAN OF THE BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION.

VOL. XVI. N-ro 188. SEPTEMBRO-OKTOBRO, 1920. PREZO 4 PENCOJ. ^{AFRANKITE} 5 PENCOJ.

KOSTO DE ABONO.—*En Britujo*, afrankite: por unu jaro, 5 ŝilingoj; unu numero, 5 penco.

Eksterlande, afrankite: por unu jaro, 5 ŝilingoj per poŝtmandato aŭ 25 respond-kuponoj kun poŝtsignoj.

Abonoj estas akceptataj ĉe la komenciĝo de ĉiu monato. Sin turni al la Sekretario, 17, *Hart-street*, London, W.C.1.



REDAKCIO.—Manuskriptojn, k.t.p., oni volu sendi al la Redakcio, 17, *Hart-street*, London, W.C.1. Tradukintoj antaŭ ol sendi siajn verkojn volu ĉiam certigi, se necese, ĉu la aŭtoro aŭ la originalaj eldonintoj permesas la represigon.

Pri artikoloj la Redakcio rezervas al si la rajton korekti la erarojn de stilo, k.t.p. Ordinare oni re esendas artikolojn neakceptitajn.

ANONCOJ.—Pri anoncoj, sin turni al la Administracio, THE BRITISH ESPERANTIST, 17, *Hart-street*, W.C.1.—Privataj anoncoj pri Esperantistaj naskiĝoj kaj edziĝoj estas enpresataj po 3 ŝilingoj por kvar linioj.

ENHAVO.

	Paĝo.
Komuniko de la Esperantista Akademio ...	113
Rakontoj el la Biblio. D-ro L. L. ZAMENHOF ...	114
La Kongreso en Hago. W. M. PAGE ...	118
Esperanto in London ...	121
Competition for Boys and Girls. Miss J. BAIRD ...	123
Al Kristana Internacio—Sesa Kongreso de Katolikaj Esperantistoj—Kun la Italaj Samideanoj ...	124
Chronicle—Coming Events ...	125
B.E.A. Meetings of Council, Notices, Guarantors, Donations, Publications Fund ...	127
Candidates for Membership, New Fellows, Examinations, F.K.I. ...	128

Komuniko de la Esperantista Akademio.

DU KONSILLOJ AL LA ESPERANTISTOJ.

Ĉar Esperanto estas vivanta lingvo, la Akademio havas nek la rajton, nek la povon trudi aŭ malpermesi ion ajn, sed la rajton ĝi havas kaj la devon doni konsilojn.

(1) La Akademio konsilas,—Krom en okazo de absoluta neceso,—uzi nur tiujn radikojn, prefiksojn kaj sufiksojn, kiuj troviĝas en la Universala Vortaro kaj en ĝiaj Oficialaj Aldonoj (Vidu *Oficiala Gazeto*.)

Ĝi cetere nun preparas trian aldonon al la Komuna Vortaro kaj organizos prilaboradon de teknikaj vortaroj kun helpo kaj kunlaborado de spertaj Esperantistoj kompetentaj en ĉiu teknika fako.

(2) Aparte *pri landnomoj*, ĝi *insiste* kaj *forte* konsilas, precipe al la Gazetoj, sed ankaŭ ĝenerale al ĉiuj Esperantistoj, kiuj konscias, ke disciplino estas absolute necesa por konservi la unuecon de nia lingvo, uzi nur la Fundamentan kaj tradician finiĝon *ujo*: Turkujo, Rusujo, Germanujo, ktp.

La Akademio memorigas, ke jam en la jaro 1909 ĝi *oficiale* voĉdonis *kontraŭ* la sufikso *i* por landnomoj. La rezultaton de tiu voĉdono

ĝi publikigis en *Oficiala Gazeto*, 25 Aprilo, 1910, p. 326.

Akcepto de la sufikso *i* por landnomoj ne sole estus grava ŝanĝo en nia Fundamento, sed ankaŭ signifus plenan disfalon de la tuta Esperanta sistemo, en kiu la vorto *Turkio*, ekzemple, nur povas havi la sencon *Turk-io*, nome, io turka aŭ *turkaĵo* tute same kiel *bon-faro* signifas *faro-bona*. La vorto *io* jam ekzistas en Esperanto, kiel memstara vorto, kun la senco *quelque chose, etwas, something*, kaj ĉar laŭ klarigoj de D-ro Zamenhof mem, (*Fundamenta Krestomatio*, p. 249; *Lingvaj Respondoj* (dua serio) p. 30; *Oficiala Gazeto*, 25 Aprilo, 1910, p. 324), ankaŭ prefiksoj, sufiksoj kaj gramatikaj finiĝoj efektive estas en nia lingvo nur memstaraj vortoj, tute similaj al la ceteraj, tial al la vorto *io* ni ne povas nun doni la sencon *lando*.

N.B.—Laŭ apliko de la artikolo 7. 2 de la regularo, la Akademio decidis, ke S-ro de Saussure ne plu estas membro de la Akademio nek de la Lingva Komitato.

Rakontoj el la Biblio

tradukitaj de D-ro L. L. ZAMENHOF.

(redaktitaj laŭ afabla permeso de la Esperantista Biblia Komitato).

VIII. Elia.

Aĥab, filo de Amri, ekreĝis super Izrael en la tridek-oka jaro de Asa, reĝo de Judujo. Kaj Aĥab, filo de Amri, reĝis super Izrael en Samario dudek du jarojn. Kaj Aĥab, filo de Amri, faris malbonon antaŭ la okuloj de la Eternulo, pli ol ĉiuj, kiuj estis antaŭ li. Ne sufiĉis al li, ke li iris en la pekoj de Jeroboam, filo de Nabat: li prenis al si kiel edzinon Izebelon, filinon de Etbaal, reĝo de la Cidonanoj, kaj li iris kaj servis al Baal, kaj adorkliniĝis al li. Kaj li starigis altaron al Baal en la domo de Baal, kiun li konstruis en Samario. Kaj Aĥab aranĝis arbareton, kaj Aĥab faris pli da incitado kontraŭ la Eternulo, Dio de Izrael, ol ĉiuj reĝoj de Izrael, kiuj estis antaŭ li. . .

Kaj Elia, la Teŝebano, el la loĝantoj de Gilead, diris al Aĥab:

— Kiel vivas la Eternulo, Dio de Izrael, antaŭ kiu mi staras, ne estos en ĉi tiuj jaroj roso nek pluvo, esceptinte la okazon, se mi tion diros.

Kaj aperis la vorto de la Eternulo al li, dirante: Foriru de ĉi tie, kaj direktu vin orienten, kaj kaŝu vin ĉe la torento Kerit, kiu fluas en Jordanon. El tiu torento vi trinkados, kaj al la korvoj Mi ordonis, ke ili tie vin nutru.

Kaj li iris kaj faris, kiel ordonis la Eternulo. Li iris kaj restis ĉe la torento Kerit, kiu fluas en Jordanon. Kaj la korvoj alportadis al li panon kaj viandon matene, kaj panon kaj viandon vespere; kaj el la torento li trinkadis.

Post kelka tempo la torento elsekiĝis, ĉar ne estis pluvo en la lando. Tiam aperis al li la vorto de la Eternulo, dirante: Leviĝu, iru Carfaton, kiu apartenas al Cidon, kaj restu tie; Mi ordonis tie al virino vidvino, ke ŝi liveradu al vi manĝaĵon.

Kaj li leviĝis kaj iris Carfaton. Kiam li venis al la pordego de la urbo, li ekvidis virinon vidvinon, kiu kolektis lignon. Kaj li vokis al ŝi, kaj diris:

— Alportu al mi iom da akvo en vazo, por ke mi trinku.

Kaj ŝi ekiris por preni. Tiam li vokis al ŝi, kaj diris:

— Alportu al mi pecon da pano en viaj manoj. Sed ŝi respondis:

— Kiel vivas la Eternulo, via Dio, mi ne havas bakitaĵon, nur plenmanon da faruno en la vazo kaj iom da oleo en la kruĉo; jen mi

kolektis du pecojn da ligno, kaj mi iros kaj pretigos tion por mi kaj por mia filo, kaj ni tion manĝos, kaj mortos.

Kaj Elia diris al ŝi:

— Ne timu; iru kaj faru, kiel vi diris; tamen antaŭe faru al mi el tio malgrandan bakitaĵon, kaj alportu al mi; kaj por vi kaj por via filo vi faros poste. Ĉar tiele diras la Eternulo, Dio de Izrael: La faruno en la vazo ne konsumiĝos, kaj la oleo en la kruĉo ne mankos, ĝis la tago, kiam la Eternulo donos pluvon sur la teron.

Kaj ŝi iris kaj faris, kiel ordonis Elia; kaj manĝis ŝi kaj li kaj ŝia domo dum kelka tempo. La faruno en la vazo ne konsumiĝis, kaj la oleo en la kruĉo ne mankis, konforme al la vorto de la Eternulo, kiun li diris per Elia.

.

Post tiu okazintaĵo malsaniĝis la filo de la virino, la mastrino; kaj lia malsano estis tre forta, tiel, ke li tute ĉesis spiri. Tiam ŝi diris al Elia:

— Kio estas inter mi kaj vi, homo de Dio? Vi venis al mi, por rememorigi pri miaj pekoj kaj mortigi mian filon!

Kaj li diris al ŝi:

— Donu al mi vian filon.

Kaj li prenis lin el ŝiaj brakoj, kaj portis lin en la subtegmenton, en kiu li loĝis, kaj metis lin sur sian liton. Kaj li vokis al la Eternulo, kaj diris:

— Ho, Eternulo, mia Dio! Ĉu eĉ al la vidvino, ĉe kiu mi loĝas, Vi faros malbonon, mortigante ŝian filon?

Kaj li etendis sin super la infano tri fojojn, kaj vokis al la Eternulo, kaj diris:

— Ho Eternulo, mia Dio, revenigu la animon de ĉi tiu infano en ĝian internon.

Kaj la Eternulo aŭskultis la voĉon de Elia; kaj la animo de la infano revenis en ĝian internon, kaj ĝi reviviĝis.

Kaj Elia prenis la infanon, kaj portis ĝin malsupren el la subtegmento en la domon, kaj redonis ĝin al ĝia patrino; kaj Elia diris:

— Rigardu, via filo vivas.

Tiam la virino diris al Elia:

— Nun mi eksciis, ke vi estas homo de Dio, kaj ke la vorto de la Eternulo en via buŝo estas vera.

.

Post multe da tempo aperis la vorto de la Eternulo al Elia en la tria jaro, dirante : Iru, montru vin al Aĥab ; kaj mi donos pluvon sur la teron.

Kaj Elia iris por montri sin al Aĥab. La malsato estis forta en Samario.

Aĥab vokis Obadjan, kiu estis lia palacestro. (Obadja estis tre diotima. Kiam Izebel ekstermis la profetojn de la Eternulo, Obadja prenis cent profetojn, kaj kaŝis ilin en kavernoj po kvindek homoj, kaj nutradis ilin per pano kaj akvo.)

Kaj Aĥab diris al Obadja :

— Iru tra la lando al ĉiuj akvaj fontoj kaj al ĉiuj torentoj ; eble ni trovos herbon, por ke ni povu konservi la vivon al la ĉevaloj kaj muloj, kaj ne ekstermiĝu al ni ĉiuj brutoj. Kaj ili dividis inter si la landon, por trairi ĝin. Aĥab iris aparte laŭ unu direkto, kaj Obadja iris aparte laŭ alia direkto.

Kiam Obadja estis sur la vojo, subite venis al li renkonte Elia. Tiu rekonis lin, kaj ĵetis sin vizaĝaltere, kaj diris :

— Ĉu tio estas vi, mia sinjoro Elia ?

Kaj ĉi tiu respondis al li :

— Mi ; iru, diru al via sinjoro, ke Elia estas ĉi tie.

Kaj li diris :

— Per kio mi pekis, ke vi transdonas vian servanton en la mano de Aĥab, por ke li mortigu min ? Kiel vivas la Eternulo, via Dio, ne ekzistas popolo aŭ regno, kien mia sinjoro ne estus sendinta min por serĉi vin ; kaj kiam ili diris, ke vi tie ne estas, li ĵurigis tiun regnon kaj popolon, ke oni ne trovis vin. Kaj nun vi diras : Iru, diru al via sinjoro, ke Elia estas ĉi tie. Kaj okazos, ke kiam mi foriros de vi, la spirito de la Eternulo forportos vin, mi ne scias kien ; mi venos, por diri al Aĥab, kaj li ne trovos vin, kaj tiam li mortigos min ; kaj via servanto estas diotima de sia juneco. Ĉu oni ne rakontis al mia sinjoro, kion mi faris, kiam Izebel mortigis la profetojn de la Eternulo, kaj mi kaŝis cent homojn el la profetoj de la Eternulo en kavernoj po kvindek homoj, kaj nutradis ilin per pano kaj akvo ? Kaj nun vi diras : Iru, diru al via sinjoro, ke Elia estas ĉi tie ! Li ja mortigos min.

Tiam Elia diris :

— Kiel vivas la Eternulo Cebaot, antaŭ kiu mi staras, hodiaŭ mi montros min al li.

Kaj Obadja iris renkonte al Aĥab, kaj diris al li. Tiam Aĥab iris renkonte al Elia. Kaj kiam Aĥab ekvidis Elia, Aĥab diris al li :

— Ĉu tio estas vi, kiu senordigas Izraelon ?

Sed li respondis :

— Ne mi senordigis Izraelon, sed vi kaj la domo de via patro, per tio, ke vi forlasis la

ordonojn de la Eternulo kaj sekvis la Baalojn. Kaj nun sendu, kunvenigu al mi la tutan Izraelon sur la monton Karmel, ankaŭ la kvarcent kvindek profetojn de Baal kaj la kvarcent profetojn de arbareto, kiuj estas nutrataj de la tablo de Izebel.

Kaj Aĥab sendis al ĉiuj Izraelidoj, kaj li kunvenigis la profetojn sur la monton Karmel.

Tiam Elia aliris al la tuta popolo kaj diris :

— Kiel longe ankoraŭ vi lamos sur du flankoj ? Se la Eternulo estas Dio sekvu Lin ; kaj se Baal, tiam sekvu lin.

Kaj la popolo nenion respondis al li.

Kaj Elia diris al la popolo :

— Mi restis la sola profeto de la Eternulo, kaj da profetoj de Baal estas kvarcent kvindek homoj. Oni donu do al ni du bovojn, kaj ili elektu al si unu el la bovoj, kaj dishaku ĝin kaj metu sur la lignon, sed fajron ili ne submetu ; kaj mi pretigos la duan bovon kaj metos sur la lignon, kaj fajron mi ne submetos. Kaj voku al la nomo de via dio, kaj mi vokos al la nomo de la Eternulo ; kaj tiu Dio, kiu respondos per fajro, estu rekonata kiel Dio.

Kaj la tuta popolo respondis kaj diris :

— Bone !

Kaj Elia diris al la profetoj de Baal :

— Elektu al vi unu el la bovoj kaj pretigu antaŭe, ĉar vi estas multaj ; kaj voku al la nomo de via dio, sed fajron ne submetu.

Kaj ili prenis la bovon, kiun li donis al ili, kaj pretigis, kaj vokadis al la nomo de Baal de la mateno ĝis la tagmezo, dirante :

— Ho Baal, aŭskultu nin !

Sed aperis nenia voĉo, nek respondo. Kaj ili saltadis ĉirkaŭ la altaro, kiun ili faris.

Kiam fariĝis tagmezo, Elia mokis ilin, kaj diris :

— Kriu per laŭta voĉo, ĉar li estas dio ; eble li havas interparoladon, aŭ eble li foriris, aŭ eble li vojaĝas ; eble li dormas, li do vekigos.

Kaj ili kriis per laŭta voĉo, kaj pikis sin laŭ sia kutimo per glavoj kaj lancoj, ĝis sango verŝiĝis sur ili. Kiam pasis la tagmezo, ili ĉiam ankoraŭ faris la ceremoniojn, ĝis venis la tempo, kiam oni faras la farunoferojn ; sed estis nenia voĉo, nenia respondo, nenia atento.

Tiam Elia diris al la tuta popolo :

— Aliru al mi.

Kaj la tuta popolo aliris al li. Kaj li rekonstruis la detruitan altaron de la Eternulo. Kaj Elia prenis dek du ŝtonojn, laŭ la nombro de la triboj de la filoj de Jakob, al kiu aperis la vorto de la Eternulo, dirante : Via nomo estu Izrael. Kaj li konstruis el la ŝtonoj altaron en la nomo de la Eternulo ; kaj li faris ĉirkaŭ la altaro foston havantan la amplekson de du grenmezuroj. Kaj li aranĝis la lignon, kaj

dishakis la bovon, kaj metis ĝin sur la lignon.
Kaj li diris :

— Plenigu kvar sitelojn per akvo, kaj oni verŝu tion sur la bruloferon kaj sur la lignon.

Poste li diris :

— Ripetu.

Kaj oni ripetis.

Kaj li diris :

— Faru same la trian fojon.

Kaj oni faris same la trian fojon. Kaj la akvo verŝiĝis ĉirkaŭen de la altaro, kaj ankaŭ la tuta foso pleniĝis de akvo.

Kaj kiam venis la tempo, kiam oni faras farunoferon, la profeto Elia aliris, kaj diris :

— Ho Eternulo, Dio de Abraham, Isaak, kaj Izrael ! Hodiaŭ oni eksciis, ke Vi estas Dio ĉe Izrael kaj mi estas Via servanto, kaj ke laŭ Via vorto mi faris ĉion ĉi tion. Aŭskultu min, ho Eternulo, aŭskultu min, por ke ĉi tiu popolo eksciis, ke Vi, Eternulo, estas Dio, kaj por ke Vi konvertu ilian koron returne.

Tiam falis fajro de la Eternulo, kaj konsumis la bruloferon kaj la lignon kaj la ŝtonojn kaj la polvon, kaj la akvon, kiu estis en la foso, ĝi forlekis.

Kiam la tuta popolo tion vidis, ili ĵetis sin vizaĝaltere, kaj diris :

— La Eternulo estas Dio ! La Eternulo estas Dio !

Tiam Elia diris al ili :

— Kaptu la profetojn de Baal, ke neniu el ili saviĝu.

Kaj oni kaptis ilin ; kaj Elia forkondukis ilin al la torento Kiŝon, kaj buĉis ilin tie.

Kaj Elia diris al Aĥab :

— Iru, manĝu kaj trinku, ĉar aŭdiĝis bruo de pluvo.

Kaj Aĥab iris, por manĝi kaj trinki ; sed Elia suriris sur la supron de Karmel, kaj kliniĝis al la tero ; kaj metis sian vizaĝon inter siajn genuojn. Kaj li diris al sia junulo :

— Iru kaj rigardu en la direkto al la maro.

Tiu iris kaj rigardis, kaj diris :

— Estas nenio.

Kaj li diris :

— Iru denove, sep fojojn.

En la sepa fojo tiu diris :

— Jen malgranda nubo, kiel manplato de homo, leviĝas de la maro.

Tiam li diris :

— Iru, diru al Aĥab : Jungu kaj forveturu, por ke vin ne retenu la pluvo.

Dume de momento al momento la ĉielo mallumiĝis de nuboj kaj vento, kaj fariĝis granda pluvo.

Kaj Aĥab ekveturis, kaj direktis sin al Jizreel. Kaj la mano de la Eternulo estis super

Elia. Li zonis siajn lumbojn, kaj kuris antaŭ Aĥab ĝis Jizreel.

Aĥab rakontis al Izebel ĉion, kion faris Elia, kaj tion, ke li mortigis ĉiujn profetojn per glavo. Tiam Izebel sendis senditon al Elia, por diri : La dioj faru al mi tion kaj pli, se mi morgaŭ en ĉi tiu tempo ne faros kun via animo, kiel estas farite kun la animo de ĉiu el ili.

Li ektimis, kaj leviĝis, kaj foriris, por savi sian vivon ; kaj li venis en Beer-Seban, kiu troviĝas en Judujo, kaj restigis tie sian junulon. Sed li mem iris en la dezerton vojiron de unu tago, kaj venis kaj sidiĝis sub unu junipero, kaj petis morton por sia animo, kaj diris :

— Sufiĉas nun, ho Eternulo ! Prenu mian animon ; ĉar mi ne estas pli bona ol miaj patroj.

Kaj li kuŝiĝis kaj endormiĝis sub unu junipero ; kaj jen anĝelo ektuŝis lin, kaj diris al li

— Leviĝu, manĝu.

Li ekrigardis, kaj jen ĉe sia kaploko li ekvidis bakitan paneton kaj kruĉon kun akvo. Kaj li manĝis kaj trinkis, kaj denove kuŝiĝis, por dormi. Kaj la anĝelo de la Eternulo revenis duan fojon, kaj ektuŝis lin, kaj diris :

— Leviĝu, manĝu ; ĉar vin atendas granda vojo.

Kaj li leviĝis, kaj manĝis kaj trinkis ; kaj per la forto, kiun li ricevis de tiu manĝado, li iris kvardek tagojn kaj kvardek noktojn ĝis Ĥoreb, la monto de Dio. Kaj tie li eniris en kavernon, kaj tradormis tie. Kaj jen aperis al li vorto de la Eternulo, kaj diris al li :

— Kion vi faras ĉi tie, Elia ?

Kaj li respondis :

— Mi fervoris pro la Eternulo, Dio Cebaot, ĉar la Izraelidoj forlasis Vian interligon, detruis Viajn altarojn, kaj mortigis Viajn profetojn per glavo ; mi sola restis, sed oni serĉas mian animon, por forpreni ĝin.

Kaj li diris :

— Eliru, kaj stariĝu sur la monto antaŭ la Eternulo.

Kaj jen la Eternulo preteriras, kaj granda kaj forta vento disŝiras montojn kaj disrompas rokojn antaŭ la Eternulo ; sed ne en la vento estis la Eternulo. Post la vento estis tertremo ; sed ne en la tertremo estis la Eternulo. Post la tertremo estis fajro ; sed ne en la fajro estis la Eternulo. Post la fajro aŭdiĝis blovado de delikata venteto.

Kiam Elia tion ekaŭdis, li kovris sian vizaĝon per sia mantelo, kaj eliris kaj stariĝis ĉe la enirejo de la kaverno. Kaj jen aperis al li voĉo, kaj diris :

— Kion vi faras ĉi tie, Elia ?

Kaj li respondis :

— Mi fervoris pro la Eternulo, Dio Cebaot,

ĉar la Izraelidoj forlasis Vian interligon, detruis Viajn altarojn, kaj mortigis Viajn profetojn per glavo; mi sola restis, sed oni serĉas mian animon por forpreni ĝin.

Kaj la Eternulo diris al li:

— Iru returne vian vojon tra la dezerto al Damasko; kiam vi venos, sanktoleu Ĥazaelon kiel reĝon super Sirio; kaj Jehun, filon de Nimŝi, sanktoleu kiel reĝon super Izrael; kaj Eliŝan, filon de Ŝafat, el Abel-Mehola, sanktoleu kiel profeton anstataŭ vi. Kaj estos, ke kiu saviĝos de la glavo de Ĥazael, tiun mortigos Jehu; kaj kiu saviĝos de la glavo de Jehu, tiun mortigos Eliŝa. Mi restigos el Izrael sep mil, ĉiujn, kies genuoj ne fleksiĝis antaŭ Baal kaj kies buŝo ne kisis lin.

Kaj li foriris de tie, kaj trovis Eliŝan, filon de Ŝafat, kiu estis pluganto; dek du bovoparoj estis antaŭ li, kaj li mem estis ĉe la dek-dua. Kaj Elia aliris al li, kaj ĵetis al li sian mantelon. Kaj tiu forlasis la brutojn, kaj ekkuris al Elia, kaj diris:

— Permesu al mi nur kisi mian patron kaj mian patrinojn, kaj mi sekvos vin.

Kaj li diris al li:

— Iru kaj revenu; ĉar kion mi faris al vi?

Kaj tiu foriris de li, kaj prenis paron da bovoj kaj buĉis ilin, kaj sur la jungaĵo de la bovoj li kuiris la viandon kaj donis al la homoj, kaj ili manĝis. Kaj li leviĝis, kaj eksekvis Elian, kaj ekservis lin.

Kiam la Eternulo volis levi Elian en ventego en la ĉielon, Elia estis iranta kun Eliŝa el Gilgal.

Kaj Elia diris al Eliŝa:

— Restu ĉi tie; ĉar la Eternulo sendas min al Bet-El.

Sed Eliŝa diris:

— Mi ĵuras per la Eternulo kaj per via animo, ke mi vin ne forlasos.

Kaj ili ekiris al Bet-El.

Kaj eliris la profetidoj, kiuj estis en Bet-El, al Eliŝa, kaj diris al li:

— Ĉu vi scias, ke hodiaŭ la Eternulo forprenos vian sinjoron de super via kapo?

Li diris:

— Mi ankaŭ scias; silentu.

Kaj Elia diris al li:

— Eliŝa, restu ĉi tie; ĉar la Eternulo sendas min al Jeriĥo.

Sed li diris:

— Mi ĵuras per la Eternulo kaj per via animo, ke mi ne forlasos vin.

Kaj ili venis Jeriĥon.

Kaj la profetidoj, kiuj estis en Jeriĥo, aliris al Eliŝa, kaj diris al li:

— Ĉu vi scias, ke hodiaŭ la Eternulo forprenos vian sinjoron de super via kapo?

Li diris:

— Mi ankaŭ scias; silentu.

Kaj Elia diris al li:

— Restu ĉi tie; ĉar la Eternulo sendas min al Jordan.

Sed li diris:

— Mi ĵuras per la Eternulo kaj per via animo, ke mi vin ne forlasos.

Kaj ili ambaŭ iris.

Kaj kvindek homoj el la profetidoj iris, kaj starigis malproksime kontraŭ ili; sed ili ambaŭ staris ĉe Jordan. Tiam Elia prenis sian mantelon kaj kunvolvis ĝin, kaj frapis la akvon, kaj ĝi dividiĝis duflanken, kaj ili ambaŭ trapasis sur sekaĵo. Kiam ili trapasis, Elia diris al Eliŝa:

— Petu, kion mi faru al vi, antaŭ ol mi estos forprenita for de vi.

Kaj Eliŝa diris:

— Duobla parto de via spirito estu sur mi.

Kaj tiu diris:

— Vi petas ion malfacilan; se vi vidos min, kiam mi estos prenata for de vi, estos al vi tiel; kaj se ne, tiam ne estos.

Dum ili estis irantaj kaj parolantaj, subite aperis fajra ĉaro kaj fajraj ĉevaloj, kaj disigis ilin; kaj Elia en ventego suprenflugis en la ĉielon. Eliŝa vidis, kaj ekkriis.

— Mia patro, mia patro, ĉaro de Izrael kaj liaj rajdantoj!

Kaj li plu lin ne vidis. Kaj li kaptis siajn vestojn, kaj disŝiris ilin en du pecojn. Kaj li levis la mantelon de Elia, kiu defalis de li, kaj reiris, kaj starigis sur la bordo de Jordan. Kaj li prenis la mantelon de Elia, kiu defalis de li, kaj frapis la akvon, kaj diris:

— Kie estas la Eternulo, Dio de Elia?

Kaj li frapis la akvon, kaj ĝi dividiĝis duflanken, kaj Eliŝa trapasis.

Kiam la profetidoj, kiuj estis kontraŭe en Jeriĥo, lin ekvidis, ili diris:

— La spirito de Elia transiris sur Eliŝan.

Kaj ili iris al li renkonte, kaj adorkliniĝis antaŭ li ĝis la tero.

Retrovota Samideano.

Insista Peto al ĉiuj Esperantistoj.

La juna belga samideano Antonio Cocks, membro de la katolika grupo Esp-ista de Antverpeno "Paco," loĝanta ĝis antaŭ la milito ĉe siaj gepatroj: Rue du Péage 52 (Tolstraat 52) Antverpeno, forlasis tiun urbon je la bombardado en la komenco de Okt. 1914, por iri al Anglujo, lando, kiun li atingis. Je la fino de 1916 li estis enregimentigita en la Belgan Armeon kaj sendita en la tendaron de Auvours (Francujo), kie lia adreso estis: Lazaret Nord 2/1. Poste, li estis en Parizo, sed neniam deĵoris en la batal-fronto de la armeo. De la monato Okt. 1918 la gepatroj perdis la postsignon de sia filo kaj neniam plu aŭdis ion pri li. Malgraŭ ĉiuj priserĉoj de la Administracioj Konsulaj, Registaraj kaj Policaĵ, oni ne sukcesis lin retrovi.

La malfeliĉaj gepatroj sin turnis kun *plej lasta espero* al la Esperantistaj samideanoj de la junulo, petegante ilin, havigi se eble informojn pri la sorto de ilia filo.

La geamikoj, kiuj povus iomete kontentigi la familion Cocks, estas petataj, sendi informojn al Delegito de U.E.A., Fran. Schoofs, Kleine Beerstraat, Antverpeno (Belgujo).

Ĉiuj gazetoj Esperantistaj estas petataj represi supran peton.

La Kongreso en Hago.

Pro la manko de spaco ni bedaŭras, ke ni povas doni nur mallongan ne detalan raporton pri la Kongreso.

La dekdua universala kongreso de Esperanto, kiu okazis en Hago de la 8a ĝis la 14a de Aŭgusto, restos en la historio de Esperanto kiel epokfaranta okazaĵo. Ĝi anoncis al la mondo la renaskiĝon de nia kara afero, kaj donis al ni novan inspiron por nia estonta progreso. Ni ne povas tro danki la energiajn samideanojn en Hago, kiuj preparis por ni tian belan kongresejon, kaj faris tiajn bonajn aranĝojn por nia ĝuado de la feliĉaj kongresaj tagoj. Kiam oni konsideras, ke ili estis petataj entrepreni la taskon nur antaŭ kelkaj monatoj, ili meritas apartan dankon. Precipe ni devas mencii S-ron J. R. G. ISBRÜCKER, la prezidanton de la Kongreso, kaj lian carman edzinon, kiu kaptis ĉiujn korojn, F-inon NELLA BOON, D-ron MEES, S-ron BRUIJN, la sekretarion-kasiston, kaj dekojn da bonvolaj helpantoj, kiuj troviĝis ĉie. Ni gratulas Hagon pri ĝia Esperantistaro. Ili estas en ĉiu socia rango. Mi parolis Esperanton kun eminenta juristo en la plej aristokrata kaj ekskluziva klubejo en Hago, kaj kun tramistoj, kaj poŝtovicistoj. Kvankam la edukitaj Holandanoj devas lerni multajn lingvojn, kaj precipe la anglan, kaj pro tio multaj ne konsentas pri la bezono de internacia lingvo, tamen oni trovis, ke en preskaŭ ĉiuj rondoj Esperanto estas konata kaj ŝatata.

* * *

Grandan honoron la Kongreso ricevis de la Nederlanda registaro, kiu permesis la uzadon de la fama antikva *Ridderzaal* por la ĉefaj kunvenoj. Ĉi tiu estas la ĉambro, en kiu la reĝino malfermas la nederlandan parlamenton kaj en kiu la dua packonferenco okazis. Multe da mondkongresoj jam okazis en ĝi, sed nun por la unua fojo homoj el diversaj landoj troviĝis parolante unu lingvon kaj komprenante unu la alian sen malfacilaĵo. Grava afero ankaŭ estis ia ĉeesto de reprezentantoj de diversaj registaroj—nome Komandanto Alberto Alessio, por la Itala ministerio de Marino; Majoro Jozefo Perogordo, por la Hispana Ministerio de Milito; S-ro J. W. Sevenhuijsen, por la Ministerio de Instruado en Nederlando; S-ro A. Pitlik por la Ministerio de Komerco kaj Turismo de Ĉeĥoslovakujo; S-ro Ivan Krestanoff, por la ministerio de Publika Instruado en Bulgarujo; kaj S-ro Kaczkovski, por la registaro de Polujo. Japana oficiala reprezentanto ne povis alveni ĝis post la fino de la kongreso.

* * *

Proksimume 400 personoj venis al la kongreso el 23 diversaj landoj. Tiu ne estas granda nombro kompare kun antaŭaj kongresoj, sed konsiderante la malfacilaĵojn de la vojaĝo kaj la valuton en la nuna tempo, la ciferoj estas tre kontentigaj. Certe la kongreso estis tre intima kaj dum la semajno multe da konatiĝoj okazis, kaj internaciaj amikiĝoj formiĝis, kiuj efikos valore por la evoluado de nia afero. Estas ĝojige, ke kongresanoj el la intermilitintaj landoj amike intertraktis sen insultado aŭ malfeliĉaĵoj, kaj kune reprenis la komunan laboron por la interfratiĝado de la popoloj.

* * *

La malforma kunsido de la kongreso, estas prezidita unue de S-ro J. M. WARDEN, kiel ano de la Konstanta Komitato de la Kongresoj. S-ro Warden salutis la Kongreson kaj proponis elekton de estraro jene: *Hon. Prez. Generalo Sébert*, Parizo; *Prez.*, S-ro J. R. G. Isbrücker, Hago; *Vic-Prezidantoj*, D-ro Mees, Hago, kaj S-ro Warden, Edinburgh; *Sekretario*, S-ro Deligny, Saint Omer, *Helpaj Sekretarioj*, S-ino Cense, Parizo kaj S-ro Bruijn, Hago. S-ro Warden transdonis la ĉefseĝon al S-ro Isbrücker, kiu atentis pri la ĉeesto de la ĉefurbestro de Hago, S-ro J. A. N. PATIJN, kiu bonvenigis la kongresanojn kaj esprimis sian simpatian por nia afero. La tempo estas oportuna por nia laboro, li diris. La prezidanto dankis la ĉefurbestron, kaj faris la malferman paroladon. Li priskribis la Esperantistaron, kiel arbon starantan kvazaŭ sen folioj. Post longa vintro la printempo jam venas. Ni sentas grandan doloron vidante tiom da malplenaj sidlokoj. Ni perdis nian Majstron, Boirac, Hodler, kaj aliajn pionirojn de nia afero. Iia laboro ne estas vana. Estas nia devo sekvi ilin. Ni devos rekonstrui, ripari, restarigi la organizaĵon. Estas feliĉe, ke oni elektis Nederlandon por la Kongreso. Ĝi estu bona grundo, sur kiu la movado povas reflori. La prezidanto alvokis al D-ro EDMOND PRIVAT, Genevo, kiu per elokventaj kaj emociigaj vortoj eldiris paneĝion de D-ro Zamenhof. Ĉe nia kongreso, li diris, unu estulo mankas kaj ĉio ŝajnas esti malplena. Li donis al ni la plej feliĉajn momentojn en nia vivo. D-ro Privat bildis Zamenhofon en lia infaneco, en liaj knabaj kaj studentaj tagoj, kiel malfeliĉan studenton en Moskvo, kiel junan kuraciston, kiel specialistan okuliston. Li parolis pri lia bela karaktero, kaj pri la vortoj de maljuna servistino, kiu diris pri la

majstro: "Tiu viro neniam pekis." La kongresanoj honoris la memoron de la mortintoj, starante en kelkmomenta silento. Sekvis salutoj de reprezentantoj el diversaj landoj: unue de la registaroj jam prialuditaj, poste el *Aŭstrujo*, D-ro Metzger; *Belgujo*, F-ino Jennen; *Anglujo*, S-ro Clayton; *Skotlando*, S-ro Kennedy; *Kimrujo*, S-ro Edwards; *Irlando*, Kol. Robinson; *Danujo*, F-ino Astrid Rybo, inspektorino de lernejoj en Kopenhago; *Finnlando*, Pastro Patiala; *Francujo*, S-ino Cense; *Francaj Kolonioj*, S-ino Tiard, Alĝerio; *Germanujo*, S-ro Rauft; *Hispanujo*, S-ro Chaler, kiu diris, ke hispanaj samideanoj nutras 500 malsatajn infanojn el Aŭstrujo; *Italujo*, S-ro Arabano; *Polujo*, S-ro Applebaum; *Svedujo*, S-ro Nylen; *Usono*, S-ro Frost, kaj el diversaj societoj. En aliaj kunsidoj venis salutoj el *Hungarujo*, *Bulgarujo*, kaj aliaj landoj. Tre plaĉis al la kongresanoj saluto sendita de la "Lord Mayor of London," jene:

The Mansion House,

As President of the World Friendship Society for the period of my Mayoralty, I desire to send the warmest greeting to the Congress of Esperantists now meeting at the Hague.

I take this opportunity of acknowledging the great service which the use of the auxiliary International Language, Esperanto, has rendered in promoting the interchange of communication between large numbers of people of all classes and creeds in the nations of the world, and thereby fostering those friendly sentiments and co-operative activities upon which the welfare and happiness of all peoples ultimately depend.

E. E. COOPER,

Lord Mayor of London.

Pro aliaj devoj ĉe alia kongreso la promesita reprezentanto de la Ligo de Nacioj ne povis ĉeesti la Kongreson, sed sendis skribitan saluton. La Kongreso telegrame salutis la Ligon.

La plej grava decido de la Kongreso rilatis la reorganizon de la Esperantistaj institucioj. Je la fino de du tre interesaj kunvenoj de Universala Esperanto-Asocio, en kiuj la ĉeestantoj diskutis kaj en principo aprobis novan statuton de la Asocio, unu membro faris demandon pri la interrilatiĝo inter U.E.A. kaj la Centra Oficejo Esperantista en Parizo, kaj esprimis deziron, ke oni povu konstrui ponton inter la du oficejoj. La delegatino de U.E.A. en Parizo respondis, ke ambaŭ institucioj laboras en plena harmonio. S-ro Komandanto Alessio (Padova) kiel nova Esperantisto rimarkis pri la manko de firma demokrata bazo ĉe la Esperantistaj oficejoj, kaj sekve de la diskuto S-ro Stettler (Berno), direktoro de U.E.A., donis skizon de propono, kiun li faris al la Pariza oficejo pri reorganizado. La ĉeestantoj opiniis, ke tiu propono estas tiel grava, ke ili petis S-ron

Stettler ripeti ĝin en la ĝenerala kunveno de la kongreso de la sekvanta tago.

En la dua ĝenerala kunveno de la Kongreso la diskutado pri organizado okupis la unuan lokon. S-ro Stettler, kiu malfermis la diskutadon, submetis, ke por Esperantaj institucioj nek nacia, nek teritoria bazo estas ebla. Oni provis per la starigo de "rajtigataj delegitoj" fari la internaciajn kongresojn kvazaŭ parlamentoj. Tio ne bone efikas, ĉar la kongresanoj, estas kutime tiuj personoj, kiuj estas sufiĉe riĉaj por povi vojaĝi longan distancon, kaj la regionaj Esperantistoj ankoraŭ ne estas sufiĉe organizitaj por pagi la vojaĝelspezojn de rajtigita delegito. Ni estas viktimoj de la vorto "Esperantujo." La kongresoj estas nur popolaj kunvenoj, ne la parlamento de ŝtato. La kongresoj ne povas ordoni. La centraj Esperantistaj institucioj devas esti bazitaj sur la kotizaĵoj de ĉiuj Esperantistoj. Ĉiuj Esperantistaj devas oferi monon por la afero. Ili rajtu elekti komitaton de 30 aŭ 40 personoj. Tiu komitato disdonu la laboron al malpli grandaj komitatoj, dividataj jene:—1. *Administrado*, registrado de membroj, servoj, praktika apliko de la lingvo. Tiu respondas ĝenerale al laboro nun farita en Berno. 2. *Lingva Komitato kaj Akademio*. Tiu laboro povas esti farita en la loko, en kiu la Prezidanto de la Akademio troviĝas. 3. *Ĝenerala Propaganda*. Tiu respondas ĝenerale al laboro nun farita en C.O. en Parizo. 4. *Instruado*. Tiu laboro povus esti kontrolata en Londono. 5. *Verkado*. Tiu laboro povus esti centrigata en Dresdeno ĉe la oficejo de Esp. Literatura Asocio. La komitato povas dividi la kotizaĵojn inter la diversaj fakoj laŭ decido. En tia organizaĵo estus nur unu aro, unu kotizaĵo.

S-ino Cense respondis, ke ĝis nun la Esperantista parlamento estas tute demokrata. La "Oficiala Gazeto" kaj oficialaj dokumentoj povas esti legataj de ĉiuj. Ŝi demandis, ĉu la Esperantistaro estas sufiĉe riĉa subteni la proponitajn oficejojn. Post tre interesa diskutado D-ro Privat (Geneva) proponis la starigon de komitato por esplori. La kongreso aprobis la jenan rezolucion:

"La Kongreso opinias necesa, ke ĝenerala internacia organizaĵo de la individuaj esperantistoj estu baldaŭ starigata por subteni la necesajn centrajn instituciojn; ĝi petas la C.O. en Parizo kaj la komitaton de U.E.A. formi komisionon por prepari planon kaj publike raporti antaŭ la printempo. Tiu komisiono konsistu el du reprezentantoj de C.O., du de U.E.A., kaj tri personoj elektotaj de la Kongreso."

Kaj aldonon proponitan de S-ro Applebaum (Liverpool) :—

“ Sed dumtempe la Kongreso petas subteni materiale la jam ekzistajn organizaĵojn, krom la naciajn, tiun de C.O. kaj U.E.A.”

La Kongreso laŭ propono de S-ro Nylen (Stockholm) elektis D-ron Arnhold (Dresden), S-ron Page (Edinburgh) kaj S-ron Poncet (Lyon) kiel anojn de la Komisiono. Ni esperu, ke sur la bazo de la raporto de tiu Komisiono nia afero povos esti firme konstruita kaj ĝia estonteco estos certigita.

* * *

La aranĝo de la specialaj kunvenoj por kristanoj, komercistoj, kuracistoj, framasonoj, pacifistoj, k.t.p. en unu posttagmezo ne estis bona, ĉar ne estis eble por unu persono, kiu interesiĝis en pli ol unu afero esti en du-tri kunvenoj je unu tempo. Sed tiuj kunvenoj bone efikis por la ĉeestantoj. Ni precipe povas paroli pri la kunveno de Komercistoj, kiujn prezidis S-ro S. R. Marshall (London). Oni konstatis la kreskantan uzadon de Esperanto, tra la mondo por komercaj celoj kaj la disvolviĝon de la laboro de Asocioj por Komuna Komerca Lingvo en ĉiuj landoj. Unu rezultato de la kunvenoj estos la eldonado en nebritaj landoj de lernolibroj de komerca Esperanto laŭ la plano de “ Pitman's Commercial Esperanto.”

* * *

Dum la vizito de la kongresanoj al la Pacpalaco S-ro Page faris malgrandan paroladon. Li diris, ke por la unua fojo la lingvo de paco aŭdiĝas en la Pacpalaco kaj ke por la unua fojo la veraj amantoj de paco troviĝas en ĝi. La palaco estas realigo de ideo de lia samnacio S-ro *Andrew Carnegie* (alp. Karnégi); ĝi estas same kiel Esperanto tute internacia en siaj elementoj, ĉar ĉiuj landoj kontribuis al ĝia konstruado; ni iru al la bela konstruaĵo reinspiritaj labori por konstrui per la disvastigado de nia lingvo la palacon de paco en ĉiu koro en la mondo.

* * *

Tre bela estis la tuttaga ekskurso al Leiden kaj la Kager-kaj Brasemar lagoj. En Leiden ni konatiĝis kun la antikva universitato kaj la preĝejo de John Robinson, de kiu la “ Pilgrim Fathers” komencis sian vojaĝon al Usono. Ĉe la ŝtuparo de la antikva urbdomo la kongresanoj estas fotografitaj, kaj oni speciale fotografis grupon de hispanaj samideanoj ĉe la pordo de la sidejo de fama urbestro, kiu kontraŭstaris la hispanojn dum la historia sieĝo de Leiden. La kongresanoj plenigis du vaporŝipetojn, kiuj laŭiris la kanalojn kaj lagojn de la regiono. Oni ĉie vidis la tipan holandan vivon kaj

pitoreskan perspektivon. Ĉie mueliloj, kanaloj, boatoj, puraj helaj vilaĝetoj, alttegmentitaj preĝejoj, interesaj homoj kaj infanoj portantaj lignajn ŝuojn. Dumtempe ni interparolis kun samideanoj el ĉiuj landoj, promenante sur la ferdeko, kaj perdis tutan senton de nacieco. Revenante al Hago, ni iris al granda kinemejo, kie ni vidis kelkajn filmojn, kiuj proklamis al la mondo la faritaĵojn de la kongresanoj kaj ebligis, ke ni povu “ vidi nin kiel aliaj nin vidas.” Precipe aplaŭdata estis la filmo de la Knaboskoltoj, anoj de la “ Skolta Esperantista Ligo,” entute ok skoltoj, kiuj partoprenis en la Kongreso vestitaj laŭ la skolta maniero, kaj altiris multan simpatian por la disvastigado de Esperanto inter la junularo de tiu mondovasta movado.

* * *

